



ADAM MICKIEWICZ



IMPROVIZACIO
DE KONRAD

EL DRAMO „DZIADY“
(„FESTO DE MORTINTOJ“).

DUA ELDONO.



ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“
:: JASLO (POLLANDO) — 1924. ::



IMPROVIZACIO.

DEKLAMOTA DUM LA XVI-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO EN VIENO.

Laŭvorta represo de la eldono el j. 1910.

ADAM MICKIEWICZ.

IMPROVIZACIO

de Konrad

el dramo „OZIADY“ („Festo de mortintoj“).

DUA ELDONO.

El pola lingvo tradukis
Roman Iwo Dobrzański.

ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“
JASLO (POLLANDO) — 1924.

PRESEJO „WISŁOKA“ JASŁO (POLLANDO).

*Al Sinjoro Antoni Grabowski, Prezidanto de
la Pola Esperantista Societo, kiel signon de
vera admiro por la subtila artismo en Liaj
poeziaj verkoj, tiun ĉi modestan laboron kun
profunda respekto kaj sindono dediĉas*

La Tradukinto.

ANTAŬPAROLO.

Ĉu agi, ĉu suferi? — Kreinton imagu
Kaj kiel Li samtempe suferu kaj agu.

Adam Mickiewicz.

Adam Mickiewicz, Juljusz Słowacki kaj Zygmunt Krasiński — jen estas tri plej grandaj polaj poetoj de la romantika epoko. — Adam Mickiewicz kreis tiun epokon en la pola literaturo, li ankaŭ okupas inter ili la unuan lokon. Ne nur per siaj senmortaj verkoj literaturaj, sed ankaŭ per sia patrioteca agado, nobla nerompebla karaktero kaj altidea propagando ĝenerala li akiris specialan amon ĉe siaj samnacioj kaj ŝaton ĉe la fremduloj.

A. Mickiewicz naskiĝis en Novogrodek (de Minska gubernio, Litovejo*) en j. 1799.

*) Ĉar oni lastatempe intencas laŭ iniciato de A. Grabowski en nia Akademio levi demandon pri la uzado de „ej“ anstataŭ „uj“ en la nomoj de landoj, mi intence en ĉi tiu Antaŭparolo uzas paralele la ambaŭ formojn, por doni eblon al la esperantistaro kompari ilin sur la sama ekzemplo kaj elekti la pli ĝustan, aŭ eble toleri la ambaŭ manierojn.

Li studis matematikon kaj filologion en la Vilna pola universitato dum la plej brila periodo de ĝia ekzistado. Post kelkaj jaroj da deviga loĝado en Rusejo (en Petrogrado kaj Moskvo) li forverturis eksterlanden en la jaro 1829-a. Vojaĝinte tra Germanujo, Italejo, Svisujo kaj Francejo, li ekloĝis en Parizo, kie li baldaŭ okupis la katedron de slavaj literaturoj en „Collège de France“. Liaj lekcioj iufoje pli similis inspiritan improvizacion de poeto, ol prelegon de profesoro kaj ofte ne estis sufiĉe vasta aŭlo, por enteni la entuziasmigitan aŭskultantaron. Mickiewicz multe agis kiel patrioto. Precipe en la lastaj jaroj de sia vivo, kvazaŭ antaŭsentante baldaŭan morton, li disvolvis energian, ne nur patriotecan, sed ankaŭ ĝenerale idean propagandon: li forlasis la katedron en „Collège de France“ kaj vojaĝadis tra Francujo, Svisejo, Italujo, predikante ĉie „kie estas oreloj por aŭskulti“ ideojn de libereco, amo kaj fratiĝo. Sed la pasia alvoko de l' poeto ne trovis eĥon; ne multaj troviĝis, kiuj lin komprenis; li tamen ne ĉesis labori: ĉie li semis novajn pensojn kaj noblajn ideojn, certa, ke iam ili ĝermos por la bono de lia nacio kaj de la homaro... Enfine, elĉerpinte de troa laborado, li mortis 1855-an en Kon-

stantinoplo, kiam li venis Turkejon kun politika misio.

Altruisto en la vivo, Mickiewicz estis ankaŭ altruisto en siaj verkoj. Mi ne intencas tie ĉi nomi ilin ĉiujn, ĉar mankas loko, por ilin preparoli, kaj solaj titoloj ne multe klarigus; mi volas nur diri kelke da vortoj pri „Dziady“ („Festo de mortintoj“), kies III-a parto enhavas la „Improvizacion“.

„Dziady“ — estas dramo, konsistanta el kvar partoj, en kiu la poeto ĉu alegorie, ĉu per buŝo de la ĉefa heroo pentras la staton de sia animo en diversaj epokoj de sia vivo. Komence estis skribitaj la I-a, II-a kaj IV-a partoj de l' dramo; en ili la poeto fermis kvazaŭ en ĉerko la historion de siaj personaj ambicioj kaj celadoj, de siaj koraj bataloj kaj suferoj, por instrui la homojn, por arverti la korojn amantajn... La III-a parto estis skribita poste, kiam Mickiewicz, estante en Drezdno, travivis gravan internan ŝanĝon: antaŭe iom egoisto, li nun fariĝas altruisto, preta meti ĉion sur la altaron de la patrujo, kies feliĉo sole indas liajn penojn kaj oferojn; similan ŝanĝon travivas ankaŭ en la III-a parto de „Dziady“ la heroo de l' dramo.

La kulminacian punkton de tiu nobla

ŝanĝo prezentas la „Improvizacio“ — monologo, kiu, laŭ streĉiteco kaj eksploda forto de la sento, apenaŭ havas ion al si egalan en la tutmonda poezio.

Jen kion skribas pri ĝi Artur Górski en sia altvalora libro pri Mickiewicz „Monsalvat“.

„Kreis ĝin („Improvizacion“) la patoso, kosma forto de l' animo, kiu starigas ĝin inter senmezuro kaj momento, ĉe sojlo de objektoj sennomaj.

„Kreis ĝin la patoso, kaj potenciajn flugilojn donis malĝojo kaj sufero super fortoj.

„Jen pro kio — tiu frenezeca, fulmotondra strio de l' penso, zigzaga, subita, ŝirita, en leonaj eksaltoj, en diskuro de l' ŝtonoj, pafitaj per interna eksplodo, — kaj samtempe — ĉi tiu potenca, transvorta, orgena ritmo de l' „Improvizacio“, frapanta kiel maro je l' bordoj.

„Kvankam kreis ĝin momento de l' nobla pronacia doloro, ĝi estas tamen antaŭ ĉio — kalkulo inter mondo kaj „transmondo“, inter kreaĵo kaj kreinto, kiam homo ekstaras sur la lasta ŝtupo de l' kreaĵo kaj vokas silentan Abismon al respondo“.

Mi elektis por esperanta traduko nome la „Improvizacion“, ĉar, memstara en si mem kaj estante vera perlo de poezio, ĝi

samtempe plej bone karakterizas la individuecon de Mickiewicz, kiu, eble, ne estas sufiĉe konata al la esperantistaro. Enfine, tiu-ĉi modesta laboro montru ankoraŭ unu fojon pli la taŭgecon de nia Fundamenta Esperanto por poezio. Lingvo, kiu estas kapabla esprimi tiel streĉitajn sentojn kaj pentri tiel grandiozajn bildojn poeziajn kiel en la „Improvizacio“ — timas neniajn konkurantojn!

En prilaborado de l' traduko mi multe ŝuldas al S-ro ^{sen}A. Grabowski, kiu ne ŝparis siajn spertajn kaj klerajn konsilojn en fikrado de la definitiva teksto. Estu do mia agrabla devo korege lin tie ĉi danki pro lia sindonema helpo.

La Tradukinto.

Rimarko: La traduko de l' Improvizacio konservas la ritmon de l' originalo, kiu plejparte estas skribita per 13-silabaj aleksandrinoj; la unua 7-silaba parto de l' verso (ĝis la cezuro) konsistas el du troĥeoj (— ◡, — ◡) kaj unu amfibraĥo (◡ — ◡), kiu povas stari sur unua, dua aŭ tria loko; la dua, 6-silaba parto de l' verso konsistas aŭ el tri troĥeoj, aŭ el du amfibraĥoj. Antaŭ la cezuro staras ĉiam neakcentita silabo. Do, la ritmo de l' aleksandrinoj prezentas sin jene:

◡ — ◡, — ◡, — ◡,	— ◡, — ◡ — ◡
— ◡, ◡ — ◡, — ◡,	aŭ
— ◡, — ◡, ◡ — ◡,	◡ — ◡, ◡ — ◡

La malplisilabaj versoj konsistas aŭ nur el troĥeoj, aŭ nur el amfibraĥoj, aŭ el kombino de la ambaŭ ritmoj. Dum legado oni devas akcenti la vortojn same kiel en prozo.



Akto I-a, Sceno II-a.

Noktomezo. Mallibereja kamero lumigita per kandelo. Sur litaĵo duonkuŝas juna politika kaptito Konrado. Ĝus foriris liaj kamaradoj (ankaŭ arestitoj), fortimigite per alproksimiĝanta patrolo. Ago okazas en Vilno dum regado de Nikolao I-a, caro de Rusujo.

Improvizacio.

KONRADO *) (*sola*).

Soleco — For de homoj — ne por ili kanto!
Ĉu homo mian kanton entute komprenos,
De l' spirito radiojn per okul' eltenos?
Por homoj — vane langon kaj voĉon lacigi:

*) Konrado estas Mickiewicz mem, kiu en j. 1823 de Vilna guberniestro Novosilcev estis arestita pro apartenado al la pola memkleriga societo de t. n. „Filaretoj“.

Ĉar lango trompas voĉon, voĉo penson trompas;
 Rapide flugas penso, ĝis vortoj ĝin rompas;
 Vortoj penson ensorbas, tremas super penso
 Kiel la tero super glutita rivero.
 Kiu profundon ĝian laŭ tremo de l' tero,
 Aŭ la direkton divenos?

Ardas sent' en animo, kaj fluas, rapidas,
 Kiel sango en vejnoj profundaj pasia;
 Kiom da sango homoj en frunt' mia vidas,
 Tiom da sent' rimarkos en kantado mia.

Kanto mia, vi stelo trans limo mondara!
 Tera okul' kuranto, post vi elsendite,
 Eĉ per vitraj flugiloj science armite,
 Fine haltos ĉe via laktvojo astrara,
 Konjektos ĝin esti sunoj,
 Sed ne kalkulos ilin, blindigite.

Al vi, kant', — ne bezonaj de homoj oreloj;
 Fluu en anim' interne,
 Brilu sur altaĵ' eterne,
 Kiel torent' subtera kaj ĉielaj steloj.

Vi Dio, vi naturo ! estu nun aŭdantoj ! —
 Vin indas la muziko, indas vin la kantoj.

Mi — majstro !

Mi, majstr', etendas manojn !
 Etendas ĝis ĉieloj, metas sur la steloj,
 Same kiel sur vitraj harmonikaj klavoj.
 Jen per malrapida, jen per mov' subita
 Mi turnas la stelaron per forto spirita.
 La sferoj ludas : fluas milion' da tonoj,
 La tonoj ĉiuj vibras, sed en miliono
 Mi kreis ĉiun, scias mi pri ĉiu tono ;

Mi jen arigas ilin, agordas, disigas,
 En brilarkojn, akordojn kaj strofojn kunligas,
 Disverŝas en milsonoj kaj en fulmaj zonoj. —

Demetis mi la manojn

Kaj levis ilin super randoj de l' mondaro :
 Tuj de la harmoniko ekhaltis klavaro.

Mem mi kantas, aŭdas la kantadon
 Longan, daŭriĝan, kiel de ventoj bruadon ;
 Ĝi penetras tra homara gento,
 Plende ĝemas, tondre bruas,
 Dum jarcentoj mute fluas !

Kaj ĉiu sono ludas, ardas en ĝi sento ;
 Mi ĝin havas en okul', orelo,
 Kiel venton, dum ond' plaŭdas,
 Mi laŭ fajfo flugon aŭdas,
 Kaj ĝin vidas en nebul-mantelo.

Dion, naturon indas ĉi tia kantado !

Kant' potenca, kant-kreado:
 Tia kanto — fort', braveco,
 Tia kanto — senmortecon !

Mi sentas senmortecon, senmortecon kreas,

Kio pli granda Vin, Dio, obeas ?

Jen, kiel mi la pensojn el mi mem eligas,

En la vortojn enkorpiĝas ;

Ili flugas, disŝutiĝas,

Rulas tra ĉiel', ariĝas ;

Brilas, ludas kaj foriĝas ;

Jam forestas, sed mi sentas

Ilin ĉiujn kaj admiras,

Al ilia ĉarm' sopiras

Kaj la movojn antaŭdiras.

Mi vin amas, idoj miaj ;

Pensoj miaj ! steloj miaj !

Sentoj miaj ! uraganoj !

Mi staras, kiel patro inter la infanoj,
 Vi ĉiuj — miaj!

Mi kredas vin, ĉiuj poetoj,
 Kaj saĝuloj, kaj profetoj,
 Kiujn mond' admiris vasta.

Se inter la spiritaj idoj migrus ili,
 Se ili ĉiujn laŭdojn kaj ĉiujn aplaŭdojn
 Aŭdus, sentus kaj ilin kiel justaj kredus,
 Kaj gloron sian ĝis momento lasta
 Radie sur laŭr-kronoj siaj lasus brili, —
 Kun tutsonar' de l' famo kaj de l' laŭr' ornamo,
 Dum tiom da jarcentoj, gentoj arigita,
 Ne sentus ili propran feliĉon kaj povon,
 Kiel mi ilin sentas dum ĉi-nokt' medita,
 Kantante en mi mem,
 Kantante por mi mem.

Jes — mi estas sentema, fortega kaj klera. —
 Neniam tiel ardis en mi la spirito —
 De mia fort' — nun krizo, nun — mia zenito,
 Nun mi scios, ĉu forta mi, ĉu nur — fiera ;
 Nun — de mia sort' ordono,
 Nun streĉos mi plej forte brakojn de l' spirito,

Nun — momento de Samsono,
Kiam meditis, blinda kaptit', ĉe l' kolono.

Sen korpo, jam spirito, mi nur plumojn prenas;

Libera, sen baroj,

Mi forflugos el stelaj kaj planedaj aroj

Tien, kie Kreinto kaj Natur' lim-tenas.

Mi havas du flugilojn ; jen ili sufiĉos ;

Etendos mi de l' okcidento

Ilin ĝis la oriento,

Estonton per maldekstra, per dekstra pasinton

Frapos, kaj Vin atingos per radi' de l' sento,

Kaj penetros de Via koro labirinton,

Vi, kiun oni kredas sentema, Kreinto !

Jen mi, mi venis ; vidu, kia forto mia :

Ĝis ĉi tie atingas flugilo radia ! —

Mi tamen estas homo, — sur ter' korpo mia ;

Mi amis tie, — hejme restis kor' pasia. —

Sed tiu amo mia, la amo surtera,

Ne ekhaltis sur unu persono mizera,

Kiel sur roza flor' la papilio :

Nek sur unu jarcento, unu familio.
 Mi amas tut-nacion! brake ĉirkaŭprenas
 De l' pasint' kaj estonto ĉiujn idojn ĝiajn,
 Ĉi-tie, ĉe la brusto mi ĝin tenas
 Kiel amik', amanto, edzo kiel patro!
 Mi ĝin volas feliĉigi,
 Tut-mondon per ĝi mirigi.
 Ne havas mi rimedon: ĝin akiri venas,
 Havante la tutpovon, per penso armitan,
 Per penso, kiu fulmojn el ĉielo ŝiris,
 Post la planedoj migris, mondleĝojn akiris;
 Mi havas pli; la Forton, ne de l' hom' donitan
 Tiun sentemon, kiu en si mem nur lumas
 Kiel vulkano, iam nur per vortoj fumas.

La Forton mi ne prenis el arbo Edena,
 De malbono kaj bono el frukto malbena,
 Nek el libroj, rakontadoj,
 Nek el la problem-solvadoj,
 Nek el sorĉaj esploradoj.
 Mi jam forta mondon iris:
 El tie potenco mia,
 Kie fonto de la Via:

Vi ĝin ankaŭ ne akiris.

Vi perdi ĝin ne timas, — ankaŭ mi ne timas.

Ĉu vi donis, ĉu prenis mi, — kie Vi prenas,

La potencan okulon : — Dum fort' mia venas,

Kaj mi vidas nubojn nigrajn,

Kaj rigardas birdojn migrajn,

Velantajn perflugile tra densa nebulo,

Se volas mi, — haltigas ilin per okulo ;

Birdoj kanton trilas plende,

Sed de mi retenate, ili haltas pende.

Kometon, se rigardas mi per spirit-povo,

Per okulo fiksate, restas ĝi sen movo.

Nur sur tero la malfortaj

Homoj vantaj, sed senmortaj,

Ne servas min, ne konas, ne konas ambaŭ nin,

Min kaj Vin.

Jen, serĉas kontraŭ ili rimedon mi ĉe Vi

Tie ĉi.

La povon, kiun havas mi super naturo,

Mi volas stampi sur homajn animojn ;

Kiel mi birdojn, stelojn regas en lazuro,

Mi devas regi de homoj intimojn —

Ne per kant' — neniun nutras,

Ne per glav' — venkebla glavo,

Nek scienc' — rapide putras,
 Per mirakl' — tro laŭta savo.

Per sento regi volas mi tie, surtere,
 Same kiel Vi regas ĉiam kaj mistere :

Al mi homoj tuj obeu,
 Ilin mi feliĉaj faros,
 Sed se ili kontraŭstaros,
 Mortu ili kaj pereu. —

La homoj estu kiel penso, aro vorta,
 El kiuj, se mi volas, iĝas kant' senmorta ;

Tiel regas Vi laŭ mitoj !

Pens' mia estas forta, parol' — ne perdita ;

Se donus al mi povon Vi super spiritoj,

Nacio de mi estus kiel kant' kreita,

Kaj kreus mi pli grandan eĉ ol Vi mirfaron :

Ekkantus de l' feliĉ' tanfaron !

Donu al mi regadon super la animoj !

Mi malŝatas de l' mondo konstruon sen forto,

Kiun homoj kutimas memkontente ĝui,

Tiel, ke mi ne provis, ĉu per unu vorto

Mi povus ĝin detrui.

Sed mi sentas interne, ke se volon mian

Streĉus mi kaj densigus, tutan radiigus,
 Cent stelojn mi estingus kaj centon bruligus.
 Ĉar estas mi senmorta! — Se la mondon Vian
 Loĝadas senmortuloj, pli altaj ne estas;
 Plej alta — en ĉieloj! Vin trovi nur restas;
 Mi, plej alta el homoj, vane tion penas.
 Ke tamen Vi ekzistas, mi tion divenas.
 Mi vidu Vin kaj sentu Vian fort-posedon;
 Mi volas regi! montru, donu la rimedon.
 Ke ekzistis profetoj potencaj, mi legis
 Kaj kredas, sed mi regas, kion ili regis,
 Mi volas havi povon, kiun vi disponas,
 Ordoni la animojn, kiel Vi ordonas. —

(longa silentado)

(kun ironio)

Silentas Vi, silentas! jes, mi Vin jam konas,
 Scias, kiu Vi estas, kiel Vi ordonas. —
 Mensogas, kiu nomas Vin ama koreco,
 Ĉar Vi estas nur saĝeco.
 Per penso — ne per koro — homoj Vin divenos,
 Nur per penso armilojn el man' Via prenos.
 Kiu, esplorante, pesis,
 Nombris, sekcis korpon, teron,

Nur al tiu ja sukcesis
 Ŝiri de Vi la misteron ;
 Trovos pulvon, mortigilon,
 Trovos bruon, fumon, brilon,
 Kaj por saĝa hom' rajtigon,
 Kaj por malsaĝul' pravigon.

Al la penso Vi donis de l' mondo ĝuadon,
 Al la koro Vi lasas eternan pentadon.

Vi donis al mi da vivo momenton,
 Sed plej potenca senton.

(silentado)

Kio — sent' mia ?

Ah, nur fajrero !

Kaj vivo mia ?

Moment'-apero !

Sed tondroj, kiuj morgaŭ bruos, estas kio ?

Nur fajrero.

Kio estas la tuta monda historio ?

Moment'-apero.

El kio hom' eliras, la malgranda mondo ?

Nur el fajrero.

Kaj kio estas morto, fin' de pensa ondo ?

Moment'-apero.

Kio estis kreinto kun mond' ne kreita?

Nur fajrero.

Kio estos eterna mond' de Li sorbita?

Moment'-apero.

Voço de maldekstra flanko.

Nun sen timo

Sur animo

Rajdos mi.

Kuru ĝi!

For, for!

Voço de la dekstra flanko.

Ho dolor'!

Ni nun konfirmu,

Flugile ŝirmu

Lin!

(post ioma silentado)

Kiam moment', fajrero brulas kaj disfluas,

Ĝi kreas kaj detruas. —

Brave! ni la momenton daŭrigu, larĝigu,
 Brave! ni la fajron ardigu, bruligu.

Jam bone, jes. Ankoraŭ foje mi Vin petas,
 Ankoraŭ mi amike deziron ripetas. —

Silento? Vi ja luktis kun satan' persone;
 Mi elvokas Vin ordone.

Respondu, mi — ne unu, kvankam venis sola:
 Sur ter' ligita kore mi kun ar' popola;

Kaj armeo min sekvas, kaj povo surtera;
 Se min ekregos de l' blasphem' furoro,

Pli sange mi batalos, ol Satan' fiero:

Per saĝo li batalis, skermos mi per koro.
 Mi amis, koro preskaŭ de turmentoj krevis;

Kiam feliĉon mian Vi de mi forigis,

Sur propra mia brusto pugnojn mi sangigis,
 Ili kontraŭ Vi ne levis.

VOĈO.

.....

Flugilojn mi donos,

Jam aglon ordonos.

For, bariloj, —

Per flugiloj

Supren! hej!

VOĈO.
.....

Ho, falanta stelo!
Kio tiras vin
Al perea celo!

(post ioma silentado)

En patrujon nun estas mi enkorpigita,
Animo ĝia estas de mi englutita,
 Mi kaj patrujo — la samo.
Mia nom' — Miliono, ĉar por milionoj
 Mi amas kaj portas katenojn.
Patrujon mi rigardas kun la fila amo,
Kiel patron, plektitan en la radan rondon!
Mi same la suferon sentas tutnacian,
Kiel patrin' en sino sentas idon sian;
Suferas mi, frenezas, dum Vi gaje mondon
 Regas, baras,
 Juĝon faras,
 Kaj, laŭ diroj, ne eraras!
Aŭskultu : se ĝi — vero, kion mi korflame
 Kredis, al la mond' venante,
Ke Vi amas ; se amis Vi, mondon naskante;

Se al naskito Via nun rilatas ame ;
 Se kor' sentema estis en de l' bestoj nombro,
 Kiujn Vi en arkeo el akvaroj ŝiris ; —
 Se tiu kor' — ne monstro, kiu viva spiris
 Okaze, sed neniam plenaĝon akiris ;
 Se sent' sub Via rego — ne mensoga ombro,
 Se centmilojn da homoj „savu nin“ krietajn
 Vi ne rigardas kiel nombrojn sinsekvantajn ;
 Se estas am' bezona en la mondo Via
 Kaj ne en kalkulado nur eraro ia...

VOĈO.

Aglo — jam hidro !
 Atake mi iru,
 Okulojn elŝiru !
 Brulo ! lum' !
 Tondro, fum' !

VOĈO.

De la suna alto
 Komet' eraranta !

Kie haltos Vi, kuranta?
Sen halto, sen halto!

(post ioma silentado)

Silentas Vi! kor' mia — tute malfermita;
Donu povon, parteton, eĉ tiom sur tero,
Kiom per ĝi atingis la homa fiero;
Per ĝi mi kiom kreus da feliĉ' revita!
Ne donos Vi pro l' koro, donu pro l' prudento!
Mi, unua el tera kaj ĉiela gento,
Ol Viaj ĉefangeloj Vin konas pli bone;
Mi indas, ke dividu Vi povon duone; —
Ĉu mi divenis veron? diru! mi ne trompas; —
Vi silentas, ĉar certe forton Vian fidas;
Sciu: sento bruligos, kion pens' ne rompas;
Jen la fajrujo mia — sento; Vi ĝin vidas; —
Mi ĝin arigas, premas, ke ardu pli flame,
Enbatas en ferkadron de la volo, same
Kiele ŝargon en fajran kanonon.

VOĈO.

VOĈO.

Fajron! paf'!

Venu sav'!

Respondu, — aŭ mi pafos kontraŭ la naturo :

En rubojn se ĝin ne detruos,
De Via tuta regno spacojn mi ekskuos ; —
Ĉar elpafos mi voĉon ĝis lim' de l' mondaro,
Krion, kiun centjaro portos al centjaro :
Ke vi ne estas patro de l' mondo, sed...

VOĈO de diablo :

...Caro !

(Konrado ŝanceliĝas kaj falas).



KRIOJ DE L' KORO

originale verkis

Salo Grenkamp-Kornfeld.

„Rememorante la tempon, kiam amsopiroj paroligas verse la junulan koron, mi tralegis la libreton de nia simpatia pola amiko Grenkamp. Dudek kvin mallongaj skizoj en versoj kaj prozo, veraj krioj de l' koro kvazaŭ taglibro de animo prezentas homajn sentojn en delikateco netuŝota. — Kvan kam mi ne estas poeto, mi bone komprenas la verkinton kaj lian vivĝojon“.

Esperanto Triumfonta (1922, No 92).

„Tiu kolekto da 25 poezietoj estas rekomendita de Esperantista Literatura Asocio, kaj vere, laŭ lingvaj kaj poeziaj reguloj ili estas tute senriproĉaj. Ili kantas amikecon, amon, naturon, deziron al paco kaj malamon al milito, Esperanton. Kelkaj estas tute originalaj kaj harmoniaj.. La libreto estas bele prezentita kaj presita..

Esperanto (U. E. A. 1923, No. 2).


PENSEROJ.

Unua Kajero. Kompilis kaj tradukis

Salo Grenkamp.

„La tradukinto kolektis pli ol 150 proverbojn, sentencojn kaj aforismojn pri edukado, moralo, etiko, laboro, vivo, morto, destino, sorto, amo, homamo, edzeco ktp., kiujn li lerte kompilis en bela arango. Legante en la libreto ni rekontas bonajn amikojn el la tuta mondo. — La traduko estas bona“.

Esperanto Triumfonta (1922, No 96).



PENSEROJ.


Dua Kajero. Kompilis kaj tradukis
Salo Grenkamp-Kornfeld.

„...Malfermu do la duan kajeron de „Penseroj“, kie *Salo Grenkamp-Kornfeld* gustplene elektis parolojn famajn aŭ trafajn pri etiko, tempo, feliĉo, devo, vivo, amo kaj esperantismo...“

Esperanto (Ĝenevo 1924, No. 2).

Ankaŭ la dua kajero de tiu serio estas riĉenhava kolekto de proverboj, sentencoj, aforismoj ktp. La traduko estas same bona, kiel tiu de la unua kajero kaj rekomendata al ĉiu.


Esperanto Triumfonta (1924, No. 174).



POSTULU TUJ

PREZARON

DE ESPERANTAJ LIBROJ ĈE LA
ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“
JASLO (POLLANDO).





ELDONEJO
„ESPERANTISTA VOĈO“
(posedanto: SALO GRENKAMP KORNFELD)
JASLO (POLLANDO)

Ni liveras ĉiujn esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj ni konsilas malfermon de konto ĉe ni. Postulu nian katalogon.

Ni rekomendas inter aliaj:

Baŭcki, Ama bileto	—25
Elski kaj Eska, Unuaj agordoj	—50
Grenkamp, Krioj de 1 ^a koro	—25
„ Penseroj, kajero la	—25
„ „ kajero Ila	—40
Kabe, Internacia krestomatio	2—
Konfucio, La vortoj	1—
Mickiewicz, Sinjoro Tadeo	6—
Orzeszko, A... B... C...	—25
Wysłouch, El la lando de ruinoj	—30
Wilde, Salome, japana eldonaĵo	1.25

Prezoj en svisaj frankoj.

Ni serĉas interrilatojn kun ĉiuj esperantaj libroj kaj volonte reprezentos ilin en Polujo.